Alvoko por la Internacia Virina Tago 2016

Skribas OSIOKA Taeko el la urbo Hirosima, Japanio.
Ni Hirosima Esperanto-Centro kiel unu el 22 organizoj sub la Plenuma Komitato de Internacia Virina Tago 2016 Hirosima sendas al vi mesagxon. Ni petas vin doni al n i vian respondan mesagxon por la Tago, kaj transdoni nian mesagxon al viaj geamikoj, viaj asocioj. Ni ekspozicios vian mesagxon cxe publikaj ejoj de la urbo Hirosima, kaj prezentos en la kunveno de la Tago.

Limdato estas la 10-a de februaro 2016, cxar ni havos ekspoziciojn de la mesagxoj ekde la 16-a de februaro.

Kun antauxdanko, OSIOKA Taeko

Mesagxo por la Internacia Virina Tago 2016, Hirosima

Estimataj, kaj karaj gesinjoroj en la mondo,

Ni, la plenuma komitato de la Internacia Virina Tago de UN 2016 Hirosima, konsistas el 22 organizoj kaj la municipo Hirosima, salutas vin solidarece, kaj elkore alvokas al vi. En la 8-a de marto, 2016, por la Internacia Virina Tago de UN, ni havos kunvenon por kunlaboro per sagxoj kaj fortoj, kaj antauxenpusxi konstruon de la socio por komuna partopreno de geviroj. Virinoj de la gubernio kaj de la urbo Hirosima organizas kunlaborojn por heredigo de la socio
paca al sekvanta generacio. Nur en paco ni povas koncentri fortojn por antauxenpusxo de komuna partopreno de geviroj.

Hodiaux ni alfrontas krizon de cxena reago de teroro kaj vengxo post la malvarma milito post la dua mondmilito, kaj ni demandas pri nia mondkoncepto en abundaj informoj. En 2015 la japana registaro sxangxis elektolegxon por publikaj oficoj, por ke ekde 18 jaragxaj homoj havu
la vocxdonrajton. Gravas ke, ni mem kiel suvereno elektu la gxustan informon pri la socio por prijugxi kaj praktiki la rajton.

La temo de Internacia Virina Tago de 2016 estas “La estontecon malfermas ni mem. Trovu la veron el abundaj informoj.” En la tago ni auxskultos prelegon de jxurnalisto de Japana Jxurnalista Asocio pri la nuna situacio kaj taskoj de jxurnalismo, por ke precipe juna generacio
povu praktiki sian vocxdonrajton kaj malfermu sian estontecon, kaj kune ni pripensos pri elekto
kaj agado al vere paca mondo.

El la atombombita urbo Hirosximo ni alvokas cxiujn en la mondo al ne perforta solvo de la problemoj por paco.

Bonvolu doni vian opinion por nuligi nuklearmilon kaj militon, ni petas. Vian mesagxon ni ekspozicios en kunvenejo de la urbo.

S-ino MATUMURA Aiko
Prezidanto de la plenuma komitato por la Internacia Virina Tago 2016, Hirosima
La municipo Hirosima

Kun virinaj organizoj:
Arko de Hirosima/ Konsilio Yui-porto / Kina karavano/ Novjapana virina asocio/ Ligo de vartistoj/
Hirosima Esperanto-Centro/Ligo de medicinaj sindikatoj/ Sindikato de emeritoj/ Instruista laborsindikato/
Ligo de solaj patrino k infano(urba)/ Laborsindikato de municipaj oficistoj/ Laborsindikato de urbaj oficistoj/
Ligo de patrinoj de la urbo / Ligo de lokaj virinaj asocioj de Hirosima/ Ligo de virinaj asocioj WENET/
Ligo de Komercistoj/ Virina demokrata klubo/ YWCA/ Centro de komuna partopreno de geviroj en la socio/
Ligo de Patrinoj de la gubernio/ Sekcio de komuna partopreno de geviroj de municipo Hirosima/
Konsilio de Kino-rondoj de la urbo.

Limdato kaj aliaj: la 10-a, februaro 2016.
Maksimume sur unu leterpapero A-5 formata. Ankaux viroj rajtas skribi al ni.
Kun notoj petataj: Nomo, sekso, agxo se eble, profesio, logxloko(urbonomo), lando.
Kontaktoadreso: OSIOKA Taeko osioka@mua.biglobe.ne.jp
Oogonzantyo 7-15, Minami-ku, Hirosima, 734-0041 Japanio